

Numero: 287.
Aprilo: 2016.

24-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefono: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Lerni naciajn lingvojn

Antaŭ nelonge mi aŭdis en iu radioelsendo, nuntempe oni ne povas ekzisti sen la scio de fremdaj lingvoj. Oni devas lerni ĉefe la anglan lingvon, ĉar ĝi estas disvastiĝinta en la tuta mondo. Kompreneble estas laŭdinde, se oni scias ankoraŭ kelkajn aliajn lingvojn. Ekzemple la francan, germanan, rusan ktp.

Kiom da lingvoj oni devus scii, ke oni povos kompreni sin perfekte en la tuta mondo?

Verdire la angla lingvo estas disvastiĝinta en multaj landoj kaj en ĉi tiuj landoj ĝin oni parolas kaj uzas denaske.

Malgraŭ tio mi asertas, eble tio ne estus la plej bona metodo, se nacia lingvo estus elektita kiel unusola pontolingvo.

Ĉiam estos kontraŭantoj, kiuj atakos ĝin pro nacia fiereco aŭ alia.

Dum historio oni povis sperti, la agnosko de iu nacia lingvo signifis kulturan kaj ekonomian subpremon. Ĉi tiuj lingvoj disvastiĝis per armilo kaj sango. Ĝi kaŭzis profundan suferon de la uzanto.

Pro ĉi tiuj perfortaj disvastigoj nacioj kaj landoj malaperis de sur la mapoj.

Mi scias, nun oni ridetante diras al mi: „Ni vivas jam en la dudekunua jarcento kaj la homaro lernis el la eraroj de niaj antaŭuloj kaj ĉio ŝanĝiĝis.

Ĉi tio estas falsa penso. Ankaŭ nun estas uloj, kies celo konkeri la mondon. Ĉi tiuj homoj estas diktatoroj. Vere nun ankoraŭ ili montriĝas en ŝafomasko.

Kompreneble mi ne kontraŭas la lernadon de iu nacia lingvo.

Jes, oni lernu ankaŭ ĝin, ĉar ĉiu lingvo estas utila. Per ĝi oni nur gajnas. Ĝi estas malgranda fenestreto por la mondo. Sed jam ĝi ne sufiĉas, se oni deziras fariĝi moderna kaj sperti, kiel agrable komuniki kun diverslingvaj homoj per neŭtrala lingvo.

Oni diras: „Mi volonte ellernus Esperanton, sed ĝi ne estas disvastiĝinta kaj nur malmultaj homoj parolas kaj uzas ĝin.

Ankaŭ la plej bona medikamento estas senefika, se oni ne enbuŝigas ĝin.

Karaj dubantoj, almenaŭ konvinkiĝu pri la utiloj de Esperanto, antaŭ ol diri pri ĝi stultajojn! Paralele kun La Zamenhofa lingvo, oni povas lerni ankaŭ aliajn lingvojn. Ĝi helpas vin en la lernado, eĉ ĝi montros al vi la ĝustan vojon.

-Redaktanto-



Internaciaj lingvoj

Kiom da internaciaj lingvoj ekzistas en la mondo krom Esperanto?

Nun mi provas kolekti kelkajn por vi. Kompreneble mi ne povas ĉiom. Se vi scias ankoraŭ kelkajn, bonvolu sendi al mi.

Mi pensas ne nur pri parolataj aŭ parolitaj, eĉ parolotaj internaciaj lingvoj. Vidu, pri kiuj mi pensas!

- ✓ La kiso
- ✓ La amo
- ✓ La sekso

Tiujn ĉi oni komprenas tra la tuta mondo. Ĉu ne? Neniu pensu, ke nur ili ekzistas. Mi konas ankoraŭ kelkajn.

Jen

- ✓ Trafiktabuloj
- ✓ Emblemoj
- ✓ Akronimoj

Laŭ mi ilin ĉiu konas. Eble nun estas tiuj, kiuj laŭte diras: „Ili ne estas internaciaj lingvoj. Kiel komuniki per ili?

Fine ni ne forgesiĝu pri la sekvaj. Tage kaj nokte ni komunikas per ili.

- ✓ Mansigno
- ✓ Mimiko
- ✓ Korpolingvo

Kompreneble ekzistas ankaŭ aliaj internaciaj lingvoj. Preskaŭ ĉiutage naskiĝas novaj artefaritaj komunikiloj. Ni pensu nur pri komputiloj. Ankaŭ ĉi tiuj „maŝinoj” uzas lingvon, la matematikon. La matematiko estas internacia lingvo. Ĉie tra la tuta ter globo, eĉ en la kosmo la komputila lingvo estas disvastiĝinta.

Kiu estu elektita el ĉi tiu giganta lingvoamaso, mi ne scias.

Mi tre ĝojus, se Esperanto okupus elstaran lokon inter la lingvoj. Ĝi jam pruvis sian vivkapablon en multaj internaciaj rilatoj.

Ĝi ne estu nur sonĝo, ke en iu tago nia lingvo helpos plibonigi la mondon kaj la diverslingvaj homoj komprenos unu la alian per ĝia helpo.

Mi scias, Esperanto ne estas eliksiro. Ĝi estas nur lingvo, kiu estis eltrovita por ni, homoj.

-Ŝaŝa-



Poezio

Poeto estas tiu homo, kies koro estas vulkano. Ĉi tiu vulkano povas eksplodiĝi en ĉiu momento. Ĝin subpremi ne eblas. La lavo inundas la tutan korpon kaj ĝi instigas la poeton surpaperigi ĉi tiujn sentojn.

Mi estimas poetojn, kiuj transdonas al ni neforgeseblajn sentojn kaj ĉi tiuj sentoj flugigas nin al la ĉielo.

Certe ĉiu poezioamanto konas ĉi tion kaj ĉiu sentas emon verki almenaŭ mallongan verseton.

Bone vi agas, se vi prenas skribilon kaj vi notas viajn sentojn sur blankan paperon.

Al Majstro de Eska

De longe sub verda standardo revuloj
Por nobla batalas afero;
Al ili ariĝas geniaj pensuloj,
Neniuj sin sentas ĉe ili fremduloj,
Ĉar ĉiujn kunligas espero.

La tero traĝis de sango la frata
Fluanta dum longaj jarmiloj...
Sed teron sekigos estonto benata,
De l' nia ideo plejkara, amata,
De l' bela estonto sunbriloj!

Hej, fratoj karegaj, de l, vero senditoj,
Per vortoj de flama fervoro
Ni igu en homoj la noblajn ekscitojn,
Ni veku kuŝantajn en dormo spiritojn
Kuraĝe al paca laboro!

El brustoj de l' homoj forigu ni ŝimon,
Estonto plihela ekflamu!
Ni veku en koroj al ago maltimon,
Ĉar vidas ni ĉiuj de celo proksimon,
Ni vivon plibele ornamu!

Regnanoj de l' mondo, celantaj la pacon,
Sur tero la amon ni semas...
Vilaĝan dometon aŭ riĉan palacon,
Ni ĉion vizitas, ne konas ni lacon,
De ĉiuj ni korojn alpremas.

Dum iro nenia haltigos nin baro,
Nek venkos la sortoj kruelaj;
Ni portas la amon al tuta homaro,
Por nia ideo en ĉiu la faro
Ni restos eterne fidelaj!

Hej, fratoj amataj de l' vero senditoj,
Ni veku kuŝantajn en dormo spiritojn.
Ni restu eterne fidelaj
Al Majstro!

El letero de Wiktor Elski

Al malproksima mi sendas kanteton,
Al malproksima, kies bona kor'
ofte ekbatis por mi kaj sekreton
Ne unu diris en laca la hor'.

Al malproksima mi sendas versaĵon,
Al malproksima, kies mola har',
La frunto hela, okul', la diaĵon
Al mi montrigis de l' okuloj par'.

Al malproksima mi sendas saluton,
Al malproksima, kiu dum forir'
Rigardis kore kaj prenis tributon
Per mia sindono kaj ama dezir'.

Al malproksima mi sendas... la koron,
Tremantan ĝoje je ŝia parol',
Al malproksima mi sendas trezoron
De l' mia animo, de l' nobla amvol'.

II.

Mi volus al vi skribi multe, multe...
Kaj kio en la mia kaŝiĝas animo
Mi volus, ho, malkovri al vi sen la timo,
Ke vi min ne komprenos.

Mi volus al vi skribi multe, multe..
Dividi miajn pensojn kun viaj samcelaj,
Mi volus al vi montri kiel senŝancelaj
La sentoj estas miaj.

Mi volus al vi skribi multe, multe...
Ke mia vivo fluas tiel senradia
Kaj ke mortas mi sola kaj melankolia,
Mi volus al vi skribi.



Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
XXII-a



Ili ekiris al la brila punkto.

Estis malvarme. Malgraŭ tio la aero estis sufoka. Johano jam sentis ĉi tiun strangan situacion. Li rememoris pri la keloaventuro sur luno. Kvazaŭ nun ĝi ripetigis.

La koridoro estis longa. La onklino Izabela iris tre malrapide. Ŝi lamis. Io okazis al ŝia maldekstra piedo.

-Ĉu via piedo doloras vin, kara onjo Izabela?

Ŝi haltis kaj diris:

-Irente malsupren sur la ŝtuparo, mi stublis kaj tiam okazis...

Johano interrompis ŝin:

-Kial vi ne diris tion al mi? Ĉu ĝi tre doloras vin? Ĉu vi povas iri?

-Jes kompreneble. Dank' al Dio ĝi ne rompiĝis. Mi jam fartas tute bone. Mi povas iri. Ĉu vi suspektas, kien kondukas ĉi tiu koridoro?



-Bedaŭrinde ne – Johano respondis kaj ili daŭrigis la iradon.

Ili silente, senparole iris. La lumo estis tre malproksime. Johano sentis, neniam ili atingos ĝin.

Fine ĉio finiĝas. Ankaŭ ili alvenis. La lumo apartenis al giganta lampo. Ĉirkaŭ ĝi ili vidis neniun.

La salono, kie staris la lampo, estis granda. Ĝiaj muroj estis el marmoroj. Ili vidis nenie elirejon. En la ejo estis nenia meblo aŭ aliaj objektoj.

Ili vane venis ĉi tien, la problemoj ne solviĝis. Vere ili transvivis la surfacon hombuĉadon, sed ĉi tie ili estas vive entombigitaj.

Johano baldaŭ koprenis, ili estas en tombo. Ĉu reiri al la surfaco, kie certe ilin atendas morto?

Kion fari? – Johano ne sciis. La onklino Izabela denove ekpanikis kaj plorante komencis kuregadi en la salono. Ĉie ŝi serĉis pardonon aŭ ion, kio kondukus eksteren.

-Nenie estas pordo, fenestro – la maljunulino diris. – Ni mortos ĉi tie. Mi ne volas morti. Dio mia savu nin!

-Trankviliĝu kara onklino Izabela – Johano diris. Vere ankaŭ sur vizaĝo bone vidiĝis ĉagreno kaj malespero. – Laŭ mi devas esti solvo. Mi opinias, ni trovos iun elirejon kaj ni povos iri el ĉi tiu kriptoj.

-Ne, ne, kara! – venis tuj la respondo. – Ni mortos ĉi tie. Mi sentas.

Johano mutiĝis kaj li sidiĝis sur la marmoran plankon. Li estis tre laca.

-Kion vi faras? – la maljunulino demandis.

-Mi cerbumas.

-Mi petegas, rapidu cerbumi, ĉar mi frezeziĝas – ankaŭ ŝi sidiĝis apud Johanon kaj ŝi amare rigardis al sia nevo.

Ili ambaŭ mutiĝis. La silento estis mortiga kaj neeltenebla. Nur en tombo povas esti simila silento.

Ili perdis la temposenton. Eble pasis nur kelkaj minutoj, sed eble horoj. Nun jam tute ne gravis. Se oni mortas, tiam la tempo ne ekzistas. Nur estas eterna nenio.

La onklino ekploris. El ŝiaj du brilantaj larmogutoj trarulis sur ŝia neĝoblanka vango.

Subite Johano eksaltis.

-Aŭskultu, onklino! – li diris regajĝante.

-Kio?

-Mi aŭdas bruojn. Kio ĝi estas? Kvazaŭ mi aŭdas proksimiĝantajn paŝojn.

-Ĉu ĉi tio estos bona por ni? – la onklino demandis dubante.

-daŭrigote-



Por infanoj

Kial parolas la papago?



La papago ne ĉiam povis imiti la parolon de la homo. Ĝi similis al la aliaj birdoj, kiuj pepadis de frumateno ĝis malfrua vespero.

Okazis en iu tago, la papago flugis al la domo de la homo kaj ĝi komencis triladi, kiel la najtingalo.

La domanoj feliĉe aŭskultis ĝin.

-La papago kantas pli bele ol la najtingalo – diris la viro. – Mi povus aŭskulti ĝin tage kaj nokte.

Ekaŭdante ĉi tion la papago iĝis tre fiera kaj fanfanoris pri sia sukceso al ĉiu.

Tiu ĉi fanfarado ne plaĉis al la griza kolombo kaj ĝi decidis puni la papagon.

-Aŭskultu min, papago! – ĝi diris. – Petu la homon, ke li instruu vin. Tiam vi povos kanti ankaŭ en homa lingvo.

La ideo tre plaĉis al la papago. Ĝi konsentis, se ĝi povos kanti en homa lingvo, tiam ĝi povos fariĝi la sincera amiko de la homo kaj certe ĝi povos loĝi kun li en la domo.

-Kiel lerni lian lingvon? – ĝi demandis scivole.

-Facile – venis fulmrapide la respondo. – Imitu lin, kiam li parolas. Dum kelkaj tagoj vi povos ellerni la homan lingvon. Vi ekvidos kiel ĝojegos la homo ekaŭdante vin kanti tiel.

La papago akceptis la proponon de la griza kolombo, kaj ĝi akompanis ĉien la homon. Ĝi notis ĉiun vorton kaj ĉiun esprimon.

Post kelkaj semajnoj ĝi bonege ellernis la homan lingvon kaj ĝi povis diri ĉion. La lerta lernemo de la papago tre plaĉis al la homo. Ĝi laŭdis la koloran birdeton.

Vere la papago ne vidis kaj ĝi ne sciis, kion deziras la viro. La papago kredis, ke de tiam ili fariĝos sinceraj, bonaj amikoj. Ili babilados pri ĉio kaj ili kune kantos vespere sidante antaŭ la domo sur la malgranda benko.

La viro iris al la foiro kaj tie li aĉetis grandan birdokaĝon. Ĝi estis bele farbita je verda koloro. La kaĝo havis malgrandan feropordon.

-Ĝi estos via domo – li diris al la papago. – Ekde hodiaŭ vi loĝos en ĝi.

La papago ne suspektis malbonon kaj danĝeron. Ĝi esperis, el la birdokaĝo ĝi povos elflugi libere. Kiam ajn ĝi povos eniĝi aŭ eliĝi. Ĝi ne estos malliberulo. Kial ĝi fariĝus malliberulo, kiam ĝia amiko estas la homo.

Trankvile ĝi okupis sian novan hejmon. Ĝin ne surprizis, kiam la pordo fermiĝis kaj la homo ŝlisis ĝin. Matene ĝi petos sian amikon kaj la pordo malfermiĝos.

Matene ĝi vane petis malfermi la pordon. La homo nur ridetis kaj li instigis la papagon kanti bele en la birdokaĝo, ĉar li deziras amuziĝi.

-Malfermu la pordon! Malfermu la pordon! – ripetadis la papago. – Ekstere mi kantos al vi, kiel antaŭe.

-Kantu en la kaĝo! – ordonis kolereme la homo. – Mi deziras, ke vi kantu ĉi tie. Se mi malfermos la pordon de la birdokaĝo, vi forflugos. Nun jam vi estas la mia.

La papago obstinis sin kaj ĝi ne kantis en la birdokaĝo. Ĝi nur diradis senĉese:

-Malfermu la pordon! Malfermu la pordon! Via papago deziras la liberecon. En la kaĝo mi ne povas kanti.

Pasis la semajnoj, pasis la monatoj, dume la papago forgesis kanti. De tiam ĝi nur parolis kaj parolis ripetante kelkajn vortojn, esprimojn, kiujn ĝi aŭdis de la homo.

Se oni estas mallibera, la sincera kanto mortas en la koro.



PRINTEMPO

PRINTEMPO

